

Kolekto : Antologio didaktika
Fako : Beletro

Julio Baghy

La Teatra Korbo Senpretenda babilado

Kun komentoj, notoj kaj didaktikaj ekzercoj
de Claude Gacond

Gaconda Metodo - Claude Gacond
Chevreuils 14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds
gacond@bluewin.ch
Eldona dato: 2000-04-07

Teatra Korbo¹

Nenio eksterordinara²

1. Iam, ie estis korbo, duonmetron alta kaj iom longe ovala. Nenio eksterordinara karakterizis ĝin. Ĝi estis nek pli alta, nek malpli bela ol ĝiaj korbofratoj. Solida manplektaĵo el salikaj vergoj. En la laca kapo de metiisto nestis ĉiutagaj panzorgoj dum liaj kalokrostaj manoj donis formon al la korbo.
2. Honesta laboro meritas atenton, fortika korbo trovos aĉetanton, - tiel povis pensi la zorgopremata simplulo, ĉar li faris ĝin

¹ Ni reproduktas la unuan parton de la aŭtobiografia novelo "La Teatra Korbo" de Julio Baghy. Tiu ĝi aperis je la paĝoj 5-16 en la 111-paĝa de la samnoma novelaro, kiun eldonis "La geamikoj de l' aŭtoro" en Leiden, 1934.

² Ni aldonis la titolojn.

rimarkinde rezistkapabla. ... Kaj ĝi trovis aĉetanton. En tiu tago freŝa pano kvietigis la malsaton de grandnombra familio. Almenaŭ estas supozeble, ĉar en kabano de la malriĉulo ĉiam abundas la panpetaj buŝetoj.

La sorto de teatra korbo

3. La korbo komencis sian devokonscian vivon. Ĝia vivprincipo estis: "Honeste laboraĵo honeste servas". Fidele ĝi gardis ĉion, kion la gemastroj metis en ĝin. Ĝia enhavo konstante variis. Komence la korbo estis tre amuzata de la vestospecoj. En ĝi sinsekve alternadis: reĝa trenaĵo kaj almozula sako, kavaliraj botoj kaj kamparanaj bastŝuoj, pastra robo kaj jakobena ĉapo, kruco kaj glavo, kasko kaj arlekena kapornamo. Ĉiuvespere ĝi estis portata en grandan vestejon, kie ĝi renkontis multajn

korbojn similajn al ĝi. Ĉiuvespere ĝi devis esti la atestanto ĉe aliformiĝo de sia mastro.

4. La korbo ne havis do kaŭzon por plendi pri unutoneco de la vivo. Nur tiam ĝi plende ekknaris, kiam la mastrino plenŝtopis kaj ĉirkaŭligis ĝin per fortika ŝnuro. Iom post iom ĝi komprenis, ke tio signifas formigron, baldaŭan konatiĝon kun novaj loĝejoj kaj restadejoj. Dum la vojaĝo ĝi estis premata al siaj korbofratoj pli aĝaj, pli spertaj. Tiuj klopodis konsoli la junan sam-sortanon.
5. - Trrro ŝŝŝtopite! ... Trrro ŝŝŝtopite! - ĝi plendis indigne.
6. - Persissstu... persissstu... - ĥore la korbofratoj reknaris.
7. Tiel dum la tuta vojaĝo. Fine ĝi al kutimiĝis. Tamen ĝi preferis la vagonaron al la kamparana veturilo... Tia estas la sorto de ĉiu teatra korbo kaj tiel ĝi vivis kelkajn jarojn. Ĝi spertis ja tiom, ke ĝi ne plu atendis ion surprizan.

Molsina vartistino

8. Tamen la sorto konservis ion surprizan por ĝi.
9. Iun tagon la korbo estis metita sub la tablon. Ĝi povis miri tre pri sia nova, nekutima enhavo. Sur ĝia profundo, nun lite remburita, kuŝis sveninta novnaskito, kiun la kurbdorsa akuŝistino fervore vangofrapadis ĝis ekviviĝo... kaj venis scivolaj najbarinoj por primiri la senfortan homidon kaj por superstiĉe sputeti al lia grimacanta vizaĝeto. La sputeto estas miraklofara rimedo kontraŭ okulsorĉo... La korbo proteste ekknaris ĉiufoje, sed kiu komprenas la indignon de protektema teatra korbo?
10. Depost tiu tago la korbo fariĝis molsina vastistino. Ĝi estis ja simpla kaj fidine forta. La alfiksitaj balancelignoj, kiuj faras la ordinarajn lulkorbojn kaprice viglaj, mankis ĉe ĝi. Neŝanceble firme ĝi kontraŭstaris al renversoj. Tio montras, ke ĝi estis konscia teatra korbo, kiun amuzis, fierigis, eĉ kontentigis la nova tasko.

Intima duopo

11. La korbo kaj la infano ofte pasigis solaj la unuan duonon de la nokto. La gemastroj ludis komedion por la pano de la realeco. Tiu intima duopo kreis reciprokan amikecon inter ili.
12. Kiam la infanaj okuloj, larĝe streĉitaj, fiksiĝis al la malsupro de la tablo aŭ vagadis al la foraj objektoj, kies konturoj perdiĝis en la palpebruma duonhelo de la petrola lampeto, staranta sur la tablo, tiam la korbo silentis kaj senvorte plenumis sian devon.
13. Kiam la piedetoj energie tamburadis sur ĝiaj salikaj ripoj, la korbo kvazaŭ tiklata ek-ekridis gaje, knare. Estas ja amuze, kiel tiu homido gimnastikas!
14. Kiam pro songpela malsato aŭ troplena stomako suferis la infano kaj li plende ploretis, la korbo tuj konsolis lin laŭ lulo de la patrinaj manoj. Ritme, centfoje ĝi ripetis la samon.
15. - Kres-ku knab!... kresku-ku knab!... kresku knab!...
16. Kiam la manoj de paciencperdinta najbarino skue volis silentigi la kriantan buŝeton, la korbo ne lasis sin renversi. Ĝi kontraŭstaris kaj indigne, rapidritme envortigis sian riproĉon al la "bonvola" vizitantino.
17. - Ve, furi', krevu vi... Ve, furi', krevu vi... Ve, furi', krevu vi...

Korba konversacio

18. Kiam la teatra trupo migris for al alia urbo, dumvoje la brava korbo gardis la tolajon de sia amiketo. En la vagono laŭ ritma skuo de la radoj ĝi fanfaronis pri sia nova tasko al la najbaraj teatraj korboj. Ili esprimis sin laŭ karaktero de siaj posedantoj.
19. - Fi, fri-vole... fi, frivole... fi, frivole... - ripetadis nekredeme la maldika korbo de anemia aktoreto, ludanta ĉiam bubrolojn.
20. - Miii ne sciiias... Miii ne sciiias... - enigme deklaris la vakstole tegita korbo de la drama heroino.
21. - Nek miii... nek miii... nek miii... - energie protestis kontraŭ nefarita supozo la korbeto de la komedia naivulino kaj eĉ ĝia enhavo ekscitite ruĝiĝis.

22. - Fa-tal!... skan-dal!... fa-tal!... skan-dal!...
- sonis alterne la basaj tonoj de du pezaj korbegoj el la angulo de la vagono. Ili esprimis la opiniojn de la tragedia heroo kaj de la direktora moŝto.
23. Nur la plata, tempmordita korboavo de la komikulo balancis sin vigle sur la supro de siaj kolegoj kaj frotante sin jen al unu, jen al alia ĝi pravigis la rakonton de la juna kolego.
24. -Jes, jes, jes... jes, jes, jes... jes, jes, jes...
25. Ĝi mem jam spertis multon kaj servis kiel lulilo por kvin sinsekvaj aktorinoj.
26. Tiel daŭris la konversacio de la korboj dum la tuta vojaĝo... kaj ĉiam tiel en ĉiu monato.

Protekta apogilo

27. Ju pli kreskis la infano, des pli firmiĝis la reciproka amikeco. La korbo instruis lin rekte stari kaj ĝia rando servis kiel protekta apogilo, kiam la knabeto faris siajn unuajn paŝojn ĉirkaŭ ĝi. Ho, kiel gaje ridis la fidela korbo!
28. Kaj iun tagon la infano superkreskis la korbon. Li grimpis sur la kanapon por rigardi tra la fenestro en la nekonatan mondon. La korbon mutigis la melankolio kaj turmentis ioma ĵaluzo. Ĉu ĝi estos forgesita de li por ĉiam?

Forgesita korbo

29. Denove ĝi komencis plenumi sian antaŭan taskon. Ĝi pleniĝis de teatraj kostumoj, fabellandaj objektoj kaj per tio ĝi reallogis sian amiketon. Ĝi estis ja bonkora simpla korbo, kiu lulis jen iluziĉifonojn, jen infanon sopirantan al iluzioj.
30. La kreskanta homido ĉiam pli malofte vizitis sian amikon. Lin allogis la mirakloj de la "mondo": la kurantaj kokidetoj sur la korto, la kolera meleagro, la ludema hundo-kamarado. Li forgesis la protekteman korbon.

Neesprimebla ĝojo

31. Iun tagon, li estis apenaŭ trijara hometo, lia patro kondukis lin al la korbo. Ĝi denove

staris sur la tablo. Ĝi protektis novan vivon: lian bukloharan fratineton.

32. La knabeto eksidis ĉe la korbo kaj mire rigardis la vivantan pupon. Li ne konsciis bone pri la donaco de la Vivo, nur tion li sentis, ke en lia koreto muzikas neesprimebla ĝojo. Li ne plus estos sola. Ne estos necese ludi kun stultaj kokidetoj, time forkuri de la sinblovanta meleagro kaj... kaj la hundo-kamarado povos veni ankaŭ en la ĉambron por kune gardi la vivantan pupon.
33. Kaj pasis semajnoj kaj monatoj. La korbo ĉiam ĝoje knaradis, ĉar estis ja tre amuze vidi kune la du infanojn. La knabeto ĉiam pli kaj pli konscie prenis al si la protektheadon de sia fratineto kaj dum la tuta tago li ludadis ĉe la korbo. Li ŝajnis esti ravita de ŝiajn skarabonigraj okuloj, laŭta ridi, nekomprenebla parolo. Pli gaja, pli feliĉa knabeto eble neniam vivis sur la tero ol li.
34. La korbo kaj la knabeto, kiel decas al bonaj amikoj, kune instruis la ĉiam viglan knabineton je la artoj de starado kaj paŝado. La korbo ne malpli gaje ridis ol la knabeto, kiam ŝi komencis paroladi. Ho, en tiu momento lia koreto preĝe akklamis. Li ne plu estos sola! Ne plu!! Lin ne plu timigos la malhelaj konturoj de la mebloj dum foresto de paĉjo kaj panjo. Li ne plu vidos moviĝantajn fantomojn en la palpebruma lumo de la nokta meĉo. Li povos diri ĉion, pri kio li songis kaj pri kio li fantazias. Ne al la kvar muroj, sed al komprenema fratineteto. Ĉion al ŝi, al tiu ridetanta animeto, kiu venis rekte el la ĉielo por forpeli la misterajn susurojn de la soleco. Anĝeleta, feineto mia, li dorlotis centkomplimente sian fratineton.
35. Ĉu ekzistas plumo, kiu kapablas priskribi la sentojn, pensojn de infano, kiu de sia naskiĝo baraktis sub la premo de soleco? Ne! Tia plumo ne ekzistas.

Preĝu, fileto!

36. Iun vesperon, lia patrino kun larmoj en la okuloj, avertis lin: "Preĝu, fileto!"... Kaj li preĝis kun premita koro ĝis ekdormo... La postan matenon li gaje kuris al la korbo kaj ĝi estis - malplena... funebre malplena. La korbo silentis.

37. Teruro ektordis la infanan koron. Kiu rajtis rabi for de li lian fratinton?
38. - La anĝelo reflugis en la ĉielon - sonis la plora patra respondo.
39. - Ĉu ŝi reflugis? Ne! Neeble! Mi ja amis ŝin... mi ja amas ŝin - kaj la knabeto falis sur la malplenan korbon.
40. La korbo plende dolore ploris kun sia amiketo kaj longe... longe... tiel longe kiel la freneziga sufero skuis lian korpon... Kaj ankoraŭ ili ofte ploris tiel kune.
41. La knabo restis sola. Ho, kiel sola li restis! En la noktaj horoj lia animo banis sin de larmoj. Lia fantazio desegnis monstro-vizaĝojn inter la ornamaĵojn de la mur-tapiŝoj kaj kreis fantomojn el la tremantaj ombroj. Ĉiun fabelon li imagis pura vero kaj ties herooj aperis antaŭ li jen por timigi, jen por kuraĝigi lin.

Sola dum la tuta vivo

42. La korbo denove migradis inter la hejmo kaj la teatra vestejo. Vespere ĝi servis por la patro, tage ĝi logis al si la filon. Tiam la knabeto staris ĉe la iluziplena korbo, rigardadis la reĝan trenajon, la almozulan sakon, prenis sur sin la pastran veston, armis sin per la kasko kaj glavo, genu-fleksis antaŭ la episkopa kruco. Sed li preferis la arlekenan ĉapon. Ĝi estis ja tiel amuza, tiel kolorriĉa, tintilhava objekto.
43. Kaj li ludis... ludis diversajn rolojn por si mem, kaj por sia sola amiko: por la teatra korbo... kaj li atendis sopire je la momento, kiam ĝi denove estos metita - sub la tablon.
44. Sopirataj mirakloj ne efektiviĝas. Li restis sola kaj dum sia tuta vivo li serĉis la perditan fratinton.

-oOo-

Didaktikaj konsiloj

Jen listo de ekzercoj strukturŝanĝaj, analizaj kaj paroligaj, kiuj estas efektivegeblaj kolektive, grupe aŭ individue. Ili konkretigas lingvajn fenomenojn gramatikajn, leksikajn kaj stilajn, kiuj estas malfacile klarigeblaj teorie.

La instruanto elektu la ekzercojn, kiuj konvenos al la lernantoj, laŭ ties lingvo-nivelo kaj interesoj. Eblas formi labor-rondojn, kiuj ricevu ekzercojn po unu aŭ du. Ĉiu grupo efektivigu la laboron proponitan kaj poste raportu al la aliaj grupoj pri siaj aktiveco kaj malkovroj.

Migrante de rondo al rondo la instruanto nur respondu al la demandoj de la lernantoj. Li lasu al la grupoj kiel eble plej grandan labor-aŭtonomion. Nur kiam grupo paneas, li alportu aktivan helpon per kunlaboro kadre de la rondo mem. Kiam li konstatas, ke la lernantoj ne plu bezonas lian ĉeeston, li rekomencu sian migradon al la aliaj grupoj.

Ekzercoj

1. Pri la korelativoj:

Situigi ĉiun korelativon en la korelativan tabelon klarigante ĝian ekzaktan signifon kaj provante rediri la koncernajn frazojn anstataŭigante la korelativojn per alia(j) vorto(j) sam-signifa(j).

Ekzemple: *Iam* (tempo nedifinita), *ie* (loko nedifinita), *iom* (kvanto nedifinita) = Foje, en montrejo estis korbo, duonmetron alta kaj longete ovala...

2. Pri la koda analizo:

Pensunuon post pensuono kodi la gramatikajn funkciojn.

Ekzemple:

Iam [5], ie [5] estis [0] korbo duonmetron alta kaj iom longe ovala [1] = 5501.

Nenio eksterordinara [1] karakterizis [0] ĝin [2] = 102.

Ĝi [1] estis nek pli arta, nek malpli bela [0] ol [/] ĝiaj korbofratoj [1] = 10/1.

[(0)] solida manplektaĵo el salikaj vergoj [1] = (0)1...

3. Pri la N-marko:

Dialekte rediri la tekston en lingvaĵo sen N-marko.

Ekzemple: Iam, ie estis korbo, duonmetre alta kaj iom longe ovala. Per nenio eksterordinara ĝi karakteriziĝis. Ĝi estis nek pli arta, nek malpli bela ol ĝiaj korbofratoj. Solida manplektaĵo el salikaj vergoj. En la laca kapo de metiisto nestis ĉiutagaj panzorgoj dum per liaj kalokrustaj manoj doniĝis formo al la korbo...

4. Pri la funkcioj 0, 1 kaj 2:

Kopii parton de la teksto substrekante la funkciojn 0, 1 kaj 2 tiel, ke kiam la kernvorto estas duliga, ĝi estu dufoje substrekita.

Ekzemple: Iam, ie estis korbo, duonmetron alta kaj iom longe ovala. Nenio eksterordinara karakterizis ĝin. Ĝi estis nek pli arta, nek malpli bela ol ĝiaj korbofratoj. Solida manplektaĵo el salikaj vergoj. En la laca kapo de metiisto nestis ĉiutagaj panzorgoj dum liaj kalokrustaj manoj donis formon al la korbo...

5. Pri la uniligaj kernvortoj:

Post la ekzerco 4-a estas instruige listigi la kernvortojn uniligajn kun ties pilotoj mallongigitaj kaj noti la koncernajn kodojn [10] kaj [01].

Ekzemple: estis korbo [01]; ĝi estis [10]; nestis panzorgoj [01]...

6. Pri la duligaj kernvortoj:

Post la ekzerco 4-a estas instruige ankaŭ listigi la kernvortojn duligajn kun ties pilotoj kaj nepilotoj mallongigitaj kaj noti la koncernajn kodojn [012], [021], [102], [120], [201] kaj [210].

Ekzemple: nenio karakterizis ĝin [102]; liaj manoj donis formon [102]; laboro meritas atenton [102]...

7. Pri statistikoj:

La ekzercoj 5-a kaj 6-a ebligas nombri, kiom da fojoj aperas la formuloj [01] kaj [10] por la pensunuoj kun kernvortoj uniligaj kaj kiom da fojoj aperas la formuloj [012], [021], [102], [120], [201] kaj [210] por la pensunuoj kun kernvortoj duligaj. El tiu nombrado eblas doni la procentaĵon de ĉiu formulo. Tiaj statistikaj analizoj konkretigas gramatikajn

fenomenojn kaj ankaŭ karakterizajn stilojn. Estas bone konservi tiujn statistikajn rezultojn por povi ilin kompari okaze de analizoj de aliaj tekstoj.

8. Pri la E-marko:

Dialekte rediri la tekston en lingvaĵo sen E-marko.

Ekzemple: Iam, ie estis korbo, duonmetron alta kaj **kun longo** iom ovala. Nenio eksterordinara karakterizis ĝin. [...] ĉar li faris ĝin rezistkapabla **laŭ rimarkinda maniero**. [...] Almenaŭ oni povas supozi, ĉar en kabano de la malriĉulo ĉiam abundas la panpetaj buŝetoj...

9. Pri la proverboj:

Stila karakterizaĵo de tiu ĉi novelo de Julio Baghy estas la proverba ofteco. Estus bone listigi tiujn ĉi proverbojn kaj provi alimaniere vortigi ilian signifon.

Ekzemple: Honesta laboro meritas atenton = Tasko plenumita kun kompetenteco altiras ĝeneralan admiron. Fortika korbo trovas aĉetanton = Kvalita produkto bone vendiĝas. En kabano de la malriĉulo ĉiam abundas la panpetaj buŝetoj = Malriĉaj homoj ĝenerale havas multajn infanojn...

10. Pri la prepozicioj:

Dialekte rediri la tekston en lingvaĵo sen prepozicioj.

Ekzemple: [...] Solida manplektaĵo **salik-verga**. Dum la kalokrustaj **metiisto-manoj** formigis **la korbon**, **lia laca kapo** estis kvazaŭ nesto, kie abundis ĉiutagaj panzorgoj...

11. Pri la transitiveco:

Dialekte rediri la tekston en lingvaĵo sen unuigaj kernvortoj.

Ekzemple: Iam, ie oni **montris** korbon, duonmetron altan kaj iom longe ovalan. Nenio eksterordinara karakterizis ĝin. **La korbisto** estigis ĝin nek pli artan, nek malpli belan ol ĝiajn korbofratojn. **Li fabrikas** solidajn manplektaĵojn el salikaj vergoj. En la laca kapo de tiu metiisto **mizero** nestigis ĉiutagajn panzorgojn dum liaj kalokrustaj manoj donis formon al la korbo...

12. Pri la netransitiveco:

Dialekte rediri la tekston en lingvaĵo, kiu havas nur unuigajn kernvortojn.

Ekzemple: Iam, ie estis korbo, duonmetron alta kaj iom longe ovala. **Per** nenio ordinara **ĝi** karakteriziĝis. Ĝi estis nek pli arta, nek malpli bela ol ĝiaj korbofratoj. Solida manplektaĵo el salikaj vergoj. En la laca kapo de metiisto nestis ĉiutagaj panzorgoj dum **per** liaj kalokrustaj manoj doniĝis **formo** al la korbo...

13. Pri la laŭtlegado:

Dividi la lernantojn en grupojn, kiuj pretigu laŭtleĝon de parto el la novelo. Ĉiu grupo ekzamenu kiel plej konvene laŭtleĝi la ricevitan tekston, laŭ ties enhavo kaj stilaj karakterizaĵoj.

Laŭtleĝe aktivu ĉiu grupo vice. La aliaj aŭskultu kaj notu siajn rimarkojn. Korektado de fuŝaj elparoloj aŭ de netaŭgaj tekstdividoj okazu nur post la laŭtlegado per malfermo de ĝenerala diskuto, kiun povas multe helpi sonbenda registraĵo realigita dum la laŭtparolado mem. Tiel la fuŝparolintoj havas la eblon aŭdi sian eraran elparolon, kio objektivigas la situacion.

Anstataŭ ol laŭtleĝi sian tekston ĉiu grupo povas ĝin mem registri aŭ registrigi fare de elektito ludanta la rolon de sontehnikisto. Ĉiuj aŭskultu la suman registraĵon notante siajn rimarkojn. Poste malfermiĝu ĝenerala diskuto pri elparolaj aŭ pri aliaj kritikindaĵoj. Tiu agmaniero estas pli produktiva ol la nura laŭtlegado, ĉar ĝi havas objektivan karakteron. Ĉiu grupo havas la okazon mem korekti sian registraĵon antaŭ la ĝenerala disaŭdigo.

-oOo-